

Gravaj informoj

Karaj abonantoj de Scienca Revuo

Kiel nova estraro de Internacia Scienca Asocio Esperantista ni kore salutas vin kaj dankas vian lojalecon al ISAE kaj ties longtradicia Scienca Revuo. Per tiu ĉi cirkulero ni volas informi vin pri kelkaj gravaj novaĵoj koncerne la pluekzistadon de nia Asocio kaj ĝia oficiala organo.

Jen la kernaj celoj de nia estraro: Scienca Revuo estu facile alirebla, kiel eble plej malmultekosta por permesi al ĉiu interesito aboni ĝin, ĝisdata koncerne la novajn komunikteknologiojn kaj reutiligebla. Por trafi siajn praktikajn celojn, la Estraro decidis utiligi la Interreton. Restos kompreneble papera formo (por arkivoj, bibliotekoj, agrabla eksterreta legado, ktp.), tamen la Interreto ebligas:

- publikigadon de aperintaj artikoloj
- kunordigadon de la redaktado kaj eldonado
- administradon de la legantaro
- haveblon de la enartikola terminologio

Retejo de la Scienca Revuo

La retejo de Scienca Revuo baziĝos sur malfermfonta sistemo jam uzita alilingve por revua eldonado. ISAE nuntempe elprovas la sistemon kaj pli kaj pli tradukas la paĝojn el naciaj lingvoj al Esperanto. La domajno de Scienca Revuo estas:

<http://scienca-revuo.info>

Ĉiu ajn povas registriĝi ĉe la retejo. En ĝi troveblas estontece la arkivoj de la revuo (ekde la jaro 1949) kaj la terminologio de la unuopaj artikoloj (ekde la jaro 2012). Dum la du unuaj jaroj de publikigado, la artikoloj estos alireblaj nur por pagintaj membroj de ISAE. Poste ili eniras la senpagan arkivon, kaj tiel estos haveblaj al ĉiu ajn. La terminologiokolektoj, kiam ili haveblas, estos ĉiam kaj por ĉiuj tute senpagaj.

Eldonsistemo de la Scienca Revuo

Estos kiel kutime kvar numeroj jare. Tiuj numeroj aperos nur en la Interreto. Tamen, fine de la jaro publikiĝos jarvolumo en la formo de libro. Ĝi estos kunmeto de la kvar jaraj numeroj kaj enhavos terminologiokolekton. La jarvolumo ankaŭ mendeblus pere de libroservoj (ekz. pere de UEA). Por havigi al si la jarvolumon, ne necesas membriĝi en ISAE.

Male, por aboni Sciancan Revuon kaj akiri alirrajton al la kvar numeroj dum la jaro, oni devas membriĝi en ISAE.

Aliĝu al ISAE ...

... perinterete

Por (re)membriĝi perinterete uzu nian novan retejon <http://sciencia-revuo.info>. Tie vi povas krei konton kaj administri viajn abonojn. Konsciu, ke la retejo estas freŝe starigita kaj bezonas testadon pri praktika uzo. Problemoj tial povas okazi; bonvolu raportiti ilin al problemoj@sciencia-revuo.info. Se vi havas demandojn pri abonoj kaj pagmanieroj skribu al abonoj@sciencia-revuo.info

... perpoŝte

Ni tre kuraĝigas vin aliĝi pere de la retejo, ĉar tio faciligas al ni la administran laboron. Tamen estas kaj restos la eblo aliĝi perpoŝte, kaze ke oni ne havas Interreton. Por aliĝi al ISAE perpoŝte, bonvolu skribi leteron al la sekva adreso:

Johannes Mueller
Solitudestraße 49/4
71638 Ludwigsburg
Germanio

Pagu la aliĝokotizojn.

La kotizoj por membriĝo en ISAE estas:

- € 8 por A-landanoj
- € 4 por B-landanoj
- € 1 por C-landanoj

La kotizoj estas pageblaj al la ISAE-konto ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA): *isae-z*. La kotizo validas por unu kalendarojaro (ekde 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro de la jaro, en kiu oni petas membriĝon) kaj ebligas aliron al la unuopaj artikoloj de la koncerna jaro en la retejo.

Por akiri la paperan jarvolumon fine de la jaro, oni krome aldonu € 12, sendepende de la landokategorio. Tiu sumo ebligas al ISAE kovri la eldonkostojn.

Ekzemplo:

Aliĝo kiel B-landano kun aliro al la enretaj artikoloj: € 4

Aliĝo kiel B-landano kun aliro al la enretaj artikoloj kaj la jarvolumo: € 16

Kontribuu!

ISAE bonvenigas verkantojn aŭ provlegantojn. Prian intereson oni povas sciigi pere de la retaliĝo aŭ kontaktante la redaktiston: redaktisto@sciencia-revuo.info. Plej facile tamen estas, registriĝi en la retejo kiel verkanto kaj poste en la persona ĉefpaĝo alklaki la butonon "Nova ensendo" kaj sekvi la instrukciojn de la retpaĝo. Denove konsciu pri la teststato de la retejo.

Ekde 2012 Sciencia Revuo havos sekvajn sekciojn: Scienco kaj Esperanto, El la scienca mondo, Terminologio, Scienco kaj socio, Sciencia Eĥo. La enhavoj de la sekcioj estas priskribitaj en la unua numero de 2012.

Ĉu restas demandoj? Senhezite kontaktu nin: informo@sciencia-revuo.info. Antaŭĝojante science legi kaj verki kun vi,

La estraro de ISAE.